

Bulgara **ESPERANTISTO**



1967

12

	Pago
Ĉefartikolo. Gvidstandardo (N. Tarakĉiev)	1
Mina Moralieva. Malamikoj	2
Cv. Todorov. Esperantistaj salutoj okaze de la Granda Oktobro	3
G. Dikovski. La homo soveta	4
* * * De la vjetnama lingvo al la japana — per Esperanto	4

ORGANIZA VIVO

Coĉo Kolarov, A. Gcnov, Nikoia Ŝumakov, Boris Kolev, Draguŝko Petrov	5
* * * UEA atakos lingvan diskriminacion	6
* * * Poŝtmarko kun Esperanta teksto	7
N. Nikolov. Ni kaj la radiodisaŭdigoj	8
Andrzej Pettyn. Antaŭ ol komenci la kurson	9
N. N. La societa vizitkarto	11
* * * Biblioteko katalogis Esperanto-literaturon	11
Mari-Hélène Bourdier. Letero el Francio	12
Viktor Aloroviĉ. Festivalo de junaj sovetiaj esperantistoj	13
Petro Poliŝĉuk. Esperantista renkontiĝo en Uzbekio	14

Kovrilpaĝo: Metalurgia Uzino en Kremikovci, kreaĵo de la sincera kaj senprofitema Bulgara-Soveta Amikeco.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1090 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamatarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

GVIDSTANDARDO

Je la 6-a de januaro 1849 en la Balkanmontara urbeto Kalofer, en la hejmo de la instruisto Botjo Petkov kaj lia edzino Ivanka Stojkova naskiĝis ilia unua ido — filo, al kiu oni donis la nomon Hristo.

La filo havis kion heredi de siaj gepatroj. La patro estis tiutempe unu el la plej elstaraj kleruloj, viro kun vigla temperamento, revoluciaj konceptoj kaj rimarkinda patriotismo. Lia patrino — nature inteligenta virino, naturdotita kaj liberama por la tiama epoko.

Jam kiel deksepjara junulo Botev forveturis por studi en la havenurbo Odesa (Rusio) laŭ la instigoj de sia patro, ĉar tie studis iam la patro mem. La soifanta je scienco animo de la malhumila bulgaro konatiĝis kun la verkoj de Ĉerniŝevski, Hercen kaj Dobroljubov. La ideoj de la gimnaziano por sociala revolucio maturiĝis kaj formis la karakteron de la estonta, juna ribelulo kaj revoluciulo. Nur dektri jarojn pli malfrue li instruis al siaj samnacionoj lecionon pri braveco kaj ekde tiam lia lernejo estiĝis la vivo.

Botev, poeto kaj revoluciulo, kombinis en si la plej belajn trajtojn de nia popolo — ĝiaj saĝeco kaj soniro, nacia potenco kaj spirita riĉeco, ĝia arda liberamo. Li ekbrilis kiel meteorŝtono por lasi oran postsignon sur la paĝoj de la historio, kaj fariĝis standardo, simbolo, idealo kaj alvoko al tiuj por kiuj la vivo signifis liberon kaj amikecon inter la homoj sur la tuta terglobo. Li elkore ekamis sian popolon kaj oferis sin por protekti ĝin de la senindulgaj tiranoj.

Sed rekompenco sufiĉas

se diros iam popolo:

Li, povra, mortis por justo,

por justo kaj por libero. . .

Kiel revolucia aganto, genia pensulo kaj humanisto li viciĝis inter la plej famaj personoj de la pasinta jarcento. Botev bonege ligis la heroan batalon de nia popolo por liberigo kun la ideoj por kreo de nova socio fremda al ĉiu subremado. Neniu el niaj gloraj agantoj el la batalepoko por liberiĝo de la popolo ĝuis tian grandan, senliman amon kaj donis tian ĉiuf flankan edukan influon al nia kreskanta generacio kiel Botev kaj lia verva verkaro. Li similis al fajro, kiu ardigos la junajn korojn kaj impulsis ilin marŝi impete antaŭen al plena homa kaj socia perfekteco. Per sia sindonemo kaj abnegacio li montris praktike kiel oni devas morti en la nomo de la komuna feliĉo, por la libero kaj sendependeco de sia multsuferinta patrolando. Ne senaŭte la nomo de Botev estis patrono de multaj niaj partizantaĉmentoj kaj fiera, nevenkebla standardo en la batalo de nia popolo por libero.

Kaj post la konkerita libereco je la Naŭa de Septembro 1944 lia nomo denove estiĝis standardo de junaj entuziasmoj laborbrigadanoj, ekvidis inspiritajn junpionirajn grupojn kaj laboristajn kolektivojn el urboj kaj vilaĝoj.

La personeco de Hristo Botev lu ŝigita per lia heroo morto kaj per la flamo de ekskluziva poezio ta ento, transformiĝis en oran stelon ĉiam brilanta super la bulgari horizonto. Ĝi brilu eterne en la plej intimaj anguletoj de niaj animoj ĝis kiam batos la koro en la brusto de ĉi bulgari patrioto kaj internaciisto, batlanto „por justo kaj por libero“, kiel testamentis al ni la neforgesebla poeto-revoluciulo.

MALAMIKOJ

de Mina Moralieva

Tio okazis dum la Dua Mondmilito. Kruelaj bataloj skuis la teron, neniigis centmilojn da homoj.

Estis la 31-a de decembro. Iom post iom ĉesis la pafado de ambaŭ flankoj. Ekestis silento, nekredebla benita silento.

Senĉese neĝis kaj la neĝo vualis per densa kurteno la valon.

El la tranĉeoj gardostarantoj atente observis la ĉirkaŭaĵon. Subite unu el ili ekstremis: iu homo proksimiĝis malrapide. Li apogis sin sur sia fusilo kaj lamiis trenante unu el siaj kruroj. Laŭ la vestaĵo la gardostaranto ekkonis, ke li estas franca soldato.

— Haltu! — ekkriis la germano — levu la brakojn!

La franco ĵetis la fusilon kaj levis siajn brakojn. Nekomprenante la vortojn li divenis kion oni postulis de li.

La germana soldato penis rememori francajn vortojn, lernitajn en la lernejo. Li provis verki el ili frazojn kaj senkonsidere transiris al Esperanta paro'o.

— Esperanto — ekkriis ĝoje la militkaptito — vi scias Esperanton! . . . Kamarado, frato, ankaŭ mi estas esperantisto. Nun ni kompreniĝos facile. . . Lasu min en libero, frato, lasu min libera.

— Mi ne povas, mi estas soldato, mi devas plenumi mian devon. Eĉ senŝence estus ke mi lasu vin libera. Kien vi iros kun tiu vundita kruro? . . .

Baldaŭ venos mia anstataŭanto kaj mi kondukos vin por ke oni bandagu vian kruron. Pli malfrue oni liberigos vin interŝanĝe kun kaptito el nia armeo.

— Dankon, dankon — flustris la franco — mi estas tre dankema al vi. Permesu al mi sidiĝi sur tiu ĉi ŝtono. Terure min doloras la kruro, mi ne povas stari.

— Sidiĝu — permesis al li la germano.

En tiu ĉi momento el la proksima urbeto alflugis solena tinto de preĝejaĵ sonoriloj.

— Ho, kiel estas bele! — diris la franca soldato. Tiuj sonoj memorigas al mi pri mia hejmo, pri mia kara edzino kaj miaj amataj infanoj. Ili renkontos la novjaron solaj, malgajaj kaj zorgoplena, ne sciante, ĉu mi estas ankoraŭ viva.

— Ankaŭ mi havas bonan edzinon, unu dolĉan knabeton kaj maljunajn gepatrojn, kiuj esperas pri mia subteno. . . Vi almenaŭ defendas vian patrolandon. Sed mi? . . . Oni igas nin invadi fremdan landon. . .

— Tiel estas. La popoloj ne estas inspiritaj malamike unu kontraŭ alia. Perforte oni instigas ilin batali.

— Jen mia anstataŭanto alvenas.

La nova gardostaranto fikskrigardis la francan soldaton.

— Do vi malamikon kaptis? Gratulon? Sed kial vi sentimentalaĉas al li?



Enpafu al li kuglon kaj —fino.

— Ja kial mortigi lin? — respondis la anstataŭita. — Li ne atakis min. Ankaŭ li estas homo ankaŭ li havas edzinon, infanojn kaj gepatrojn. . . Levigu, ni iros — turnis sin li al la franco kaj etendis manon por helpi al li.

— Dankon, dankon, kamarado, mi deziras al vi reveni viva kaj sana al viaj hejmanoj.

— Mi dankas. Samon mi deziras ankaŭ al vi. Nu, ni iru!

La neĝado ĉesis. Sur la tero, plugita

de obusoj kaj minoj sternis sin neĝa kovrilo, sed ĝi ne povis forviŝi ĉiujn postsignojn de la bataloj. Ĉie elstaris la ruinigitaj kanonoj kaj tankoj. Eĉ la frostigitaj jam manoj, kruroj kaj kapoj de mortigitoj elmontrigis.

Ambaŭ soldatoj moviĝis ege deprimataj pro la abomena vidaĵo.

— Kia teruro! — ekĝemis la franco — kaj pro kio?

— Jes, pro kio? — ripetis ankaŭ la germana soldato.

Tradukis: *Liljana Moralieva*

ESPERANTISTAJ SALUTOJ OKAZE DE LA GRANDA OKTOBRO

Inter la bulgaraj kaj sovetiaj esperantistoj ekzistas malnova kaj sincera amikeco, kiu estas parto de la granita amikeco inter niaj du popoloj. Jen kial la rimarkinda duonjarcenta jubileo de la Granda Oktobro estas vera festo ankaŭ por la bulgaraj esperantistoj.

La membroj de Ŝumena E-societo „Vekiĝo“ decidis inde celebri tiun ĉi brilan datrevenon. La societa estraro akceptis specialan planon por partopreno en tiu ĉi tutpopola festo, kun granda ĝojo oni akceptis la proponon de iuj membroj ke ni sendu salutkartetojn al esperantistoj kaj E-grupoj en USSR. Por efektiviĝi la belan iniciaton oni serĉis la helpon de la Komitato por Bulgara-Soveta Amikeco en Ŝumen.

Ĝia prezidanto k-do Denju Popov renkontis tiun deziron de la esperantistoj kun plena aprobo kaj entuziasmo. Li tuj subtenis la iniciaton kaj donis monon por ĝia efektivigo. La fondita grupo de aktivaj esperantistoj en limigita tempo skribis kaj dissendis pli ol 100 salutkartetojn al esperantistoj kaj E-grupoj en ĉiuj anguloj de la granda Sovetia lando. Per ili ŝumenaj esperantistoj je sia nomo kaj je la nomo de la Komitato por Bulgara-Soveta Amikeco adresis fratajn salutojn kaj korajn bondezirojn por pluaj sukcesoj en la konstruado de la komunismo, en la batalo por konservo de la paco kaj por disflorado de la Bulgara-Soveta Amikeco.

Cvijatko Todorov

INTERNACIA RENKONTIĜO

de komercistoj-esperantistoj okazos dum la printempa foiro 1968 en Leipzig, sabaton, 9. 3., 19-a horo, en: Klub der Intelligenz „Gottfried Wilhelm Leibniz“, Elsterstr. 35. Post modesta kul-

turprogramo estos eblecoj konversaciadi laŭdezire. Interesuloj anoncu partoprenon al: Germana Kulturligo-Esperanto, 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115, GDR.

LA HOMO SOVETA

de Georgi Dikovski

Enviu, Ordioj —
burgaro misfara,
vi ratoj — magnatoj!
Vi kiuj ja ĉie trumpete
profetis:
„Ordeto
Soveta? . .
La homoj ne konas
ja tian
socion. . .
Ĝi falos!“
Rabistoj mallumaj
per fumo
milita, profiton
vi prenis. . .
Sed. . . jenis
malbeno:
vi, dioj, vi ĉiuj —
tutputris!
Refuti
la veron ne eblas!
Vi mutas, balbutas?
Impete
kaj cele ribelis
Rusio!
Kaj ĉian
katenon frakasis
l' amasoj!
Malame kaj flame
tutŝtormis la normojn
propraĵojn.
Eknaĝis
pasie Rusio
en nomo de l' homa
feliĉo.
Kaj kreis
alian socion —
plej veran,
plej teran!

La mondo
aplaŭdas kaj miras.
Akiris
ĉi tiu socio
jam novajn
krepovojn:
Tra l' kosmo
forfosis
kuraĝajn vojaĝojn
unuaj
plej frue
Sovetoj,
rakete elmetis,
elĵetis
la Homon el domo,
el sino proksima
surtera.
Fiera, libera li staras
sen baro! . .
Fekundo, abundo,
La turojn kulturajn,
sciencon, potencon —
Li vere
konkeris
ĉi homo
kun nomo
Soveta,
enviu, „profetoj“,
enviu!
De Oriento
ĝis Okcidento,
de norda ĝis suda
poluso,
de Venuso
divenis la sekretojn
la homo Soveta! . .
Enviu, „profetoj“!
Novembro 1967
Sofia

DE LA VJETNAMA LINGVO AL LA JAPANA — PER ESPERANTO

(IGS/662) Tokio. — La vjetnama novel-kolekto „Meze de l' flamoj“ kun 12 noveloj de 9 aŭtoroj ĉi-jare aperis en japana traduko, eldonita de Tôhō-Syuppansya (Eldonejo Oriento). Ĝi jam atingis plurajn represojn en la sama jaro. Notinde estas, ke la traduko estis farita laŭ la eldono en Esperanto, kiu aperis en 1965. La tradukintoj klarigas, ke la fikeksebla strukturo de Esperanto permesas tre fidelan redonon de la

senĉo eĉ tra dufoja traduko de la vjetnama en Esperanton kaj de Esperanto en la japanan. En ĉiu okazo, traduki-stoj kapablaj traduki rekte el la vjetnama en la japanan estas preskaŭ netroveblaj. La unua tia traduko per Esperanto de la vjetnama al la japana estis la romano „Franto Tu Haŭ“, eldonita de Sin-Nippon-Syuppansya (Eldonejo Nova Japanio) en 1965. Ambaŭ libroj jam vendiĝis en pli ol po 10 000 ekzempleroj.



MITINGO DEDIĈITA AL LA PACO KAJ AMIKECO

Estiĝis tradicio ĉiujare en vilaĝo Borima, distrikto de Loveĉ, gastu iu eksterlanda esperantisto. Ĉi-jare en la vilaĝo gastis la tuta internacia esperanta laborbrigado.

Vespere la 12-an de aŭgusto en la vilaĝo okazis granda mitingo dediĉita al la amikeco kaj paco. Ĉeestis la tuta vilaĝanaro kaj geesperantistoj el Loveĉ kaj Trojan. La mitingon salutis K. Bankov, sekretario de la Komunuma Komitato de BKP; Stojĉo Ŝoŝkov, prezidanto de Patrolanda Fronto kaj Prezidanto de loka E-societo „Nova Mondo“; Bojidar Leonov, prezidanto de STELO kaj ĉefkomandanto de la Laborbrigado; Jerĵi Vetski, Pollando; Jan Vasahlo, Ĉeĥoslovakio; Mada Raiĉ, Ju-

goslavio; Aleks Jakob, Hungario; Fimke Kalsbuk, Nederlando; Marie-Helene Bourdier, Francio.

Post la mitingo okazis granda popolamuziĝo, kiu finiĝis per bulgaraj rondodancoj.

Je la alia tago en la Esperanta parko proksime de la vilaĝo okazis junulara renkontiĝo, en kiu partoprenis ankaŭ multe da gejunuloj el la proksimaj urboj kaj vilaĝoj. Estis plenumita varia muzika programo de diversaj ensembloj. Poste komenciĝis junulara amuzo.

Posttagmeze futbala teamo konsistanta el brigadanoj de diversaj landoj ludis matĉon kontraŭ la loka teamo „Vihr“. La matĉo finiĝis 2:1 por la loka teamo.

Je la nomo de la Brigadestraro ankoraŭ unufoje ni profitas la okazon danki al ĉiuj vilaĝanoj pro la kora akcepto kaj sincera gastameco rilate la laborbrigadon.

Coĉo Kolarov

URBO TVÂRDICA, DISTRIKTO DE SLIVEN

La esperantistino Neda Zlateva invitis nin el Nova Zagora por organizi grandan *Esperanto-ekspozicion*.

Du tagojn (12—13. X. 1967) viciĝis la urbanaro kaj gelernantoj en la salono de la Legejo en la balkana urbeto Tvârdica por spekti milojn da vidindaĵoj el tutmondo: foto-bildoj kaj portretoj el diversaj landoj, kie la popoloj ankaŭ soifas pri amikeco kaj paco kiel ni.

Oni legis multajn leterojn el Nov-Zelando, Malajzio, Islando, Hispanio k. a. kies kovertoj kun ege ekzotikaj poŝtmarkoj allogis la lernantojn filatelistojn.

Oni povis aŭdi utilajn por nia lingvo eldirojn antaŭ la metitaj sloganoj de

Barbusse, Iv. Vazov, T. Pavlov k. a. En la salono estis konstanta deĵoranto kiu donis necesajn klarigojn pri la ekspoziciaĵoj, kaj lige kun tio pri siaj vojaĝoj en Eŭropo.

Solene flirtis Esperanto-standardo je la fasado de la Legejo salutante la aŭto-vojaĝantojn veturantajn sur la ĉefvojo Sofio—Burgas. La publiko estis surprizita vidinte gastojn el eksterlando. „Ĉu vi estas organizanto? Mi gratulas vin“ — diris la geedzoj Zbigniew kaj Stela Lutogniewski, ambaŭ parolistoj ĉe Radio Varsovio.

Ĉio ĉi bone influis al nia iniciato, kaj oni povas esperi pri fruktodona rikolto en tiu urbeto.

A. Genov

LA JUNULARO DE ĤASKOVO KAJ

DIMITROVGRAD EKSURSAS

La iniciato de la junulara grupo en urbo Ĥaskovo estis entuziasme akceptita de la junularo en Dimitrovgrad. La societaj estraroj decidis organizi dum la somero kaj aŭtuno kelkajn komunajn renkontigojn kaj ekskursojn al interesaj historiaj lokaj kaj naturobjektoj.



La unua ekskurso-renkontigo okazis ĉe la „Sanktejo de la nimfoj kaj Afrodito“, proksime ĉe vilaĝo Kasnakovo. Unua venis la grupo de dimitrovgradanoj kaj post nelonge alvenis la grupo el Ĥaskovo. La herbejo antaŭ la Sanktejo sonpleniĝis de esperanta parolado. La prezidanto de la junulara grupo en Ĥaskovo Nikola Marĉev salutis la ĉe-

estantojn, post kio Boris Kolev parolis pri la konservitaj arkeologiaj restaĵoj de la Sanktejo kaj antikva teatro, konstruitaj de tracoj en la III j. c. p. n. e. Tutan tagon la historia loko estis plenumita per rido kaj ĝojo de la junaj geesperantistoj. Vespere ĉiuj revenis hejmen gajaj kaj kontentaj.

La sekvanta komuna ekskurso estis organizita al la montosupro „Meĉkovec“ (monto de la ursoj) kaj montodomo „Aida“. Nun partoprenis pli da gejunuloj. La kantoj ĉe la fajro, la gajaj anekdotoj kaj la rido daŭris ĝis meznokto. Frumatene, la tuta grupo estis sur la montosupro, de kie la panoramo al Rodopi montaro kaj Trakia ebenaĵo estas tre pitoreska kaj vastega. La grupo vizitis kelkajn interesajn lokojn en la regiono de la montodomo, kie iam vagis la partizana taĉmento „As. Zlatarov“. Neforgeseblaj restos

la tagmango ĉe la arbara fonteto „Diljanka“, la vagado sur la florplenaj herbejoj kaj la banado en la mineralakva baseno.

La komunaj ekskursoj estas paŝo kiu amikigas pli multe la junajn geesperantistojn el Ĥaskovo kaj Dimitrovgrad.

*Nikola Ŝumakov
Boris Kolev*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ATAKOS LINGVAN DISKRIMINACION

(IGS/660) Rotterdam. — Universala Esperanto-Asocio, la monda organizaĵo por la Internacia Lingvo, planas ampleksan agadon okaze de la Internacia Jaro de Homaj Rajtoj 1968, deklarita de Unuiĝintaj Nacioj. La Asocio, kies Centra Oficejo troviĝas en Rotterdam,

aparte atakos la multspecan formojn de lingva diskriminacio, kiun specife kondamnas en sia 2-a artikolo la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Kiel unua paŝo, ĝi reeldonis kaj distribuas tra la tuta mondo la Esperantan tekston de la Universala Deklaracio, kiu ĝis nun aperis entute en 61 lingvoj.



LINGVO DE PACO KAJ AMIKECO

La Poŝtista Esperanto-Societo „Heroldo“ en Sofio, honore al la 50-jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, okazigis fine de septembro sian regulan ĉiusemajnan kunvenon, traktante la laboron de la Societo kaj planante serion da kulturklerigaj kaj sociale utilaj entreprenoj por aktiva partopreno de la membroj en la lernado kaj sinperfektigo en la internacia lingvo Esperanto.

Ĉeestis ĉ. 50 esperantistoj el la telegrafopostaj kaj radio-televidaj entreprenoj en la ĉefurbo kaj esperantistoj emeritoj.


La kunvenon ĉeestis kiaj karaj gastoj la sovetiaj geesperantistoj: Mihail Nikolajevič Rotmistrov — profesoro de mikrobiologio, kaj Nadja Andrianova — verkistino, ambaŭ el Kiev, Zoja Skvorcova el Kujbiŝev kaj Nina Ŝirjaeva el Ŝadrinsk, Siberio.

La gastoj, kiuj vizitis nian landon okaze de la Monato de Bulgara-Soveta Amikeco, rakontis al nia kunveno en Esperanto pri la preparado, kiun la sovetianoj nun efektivas por celebri la Grandan Oktobron, kaj pri la grandaj skaloj de konstruado en Sovetunio.

Ili parolis pri la malnova amikeco inter la sovetaj kaj bulgara popoloj, pri

la proksimeco de la lingvo kaj la komunaj interesoj, pri la sovetaj kaj ukraina poezio ktp.

Zoja Skvorcova en sia eldiro emfazis, ke la loĝantoj de Kujbiŝev (iama Samara) donacis relikvon karan por ĉiu bulgara k ro — la Samara-standardon, sub kiu antaŭ 90 jaroj batalis kaj pereis amataj filoj de la rusa popolo kaj bulgaraj volontuloj; per la verŝita sango



Soniaj geesperantistoj manifestacias je la 9-a de Septembro

tamen cementigis por ĉiam la amikeco kaj frateco inter la du popoloj.

La renkon'to inter esperantistaj poŝtistoj kaj niaj karaj gastoj el frata Sovetunio pasis en korvarma kaj amika etoso, kaj ĝi por longa tempo postlasos daŭrajn impresojn ĉe la ĉeestantoj.

Draguŝko Petrov
prezidanto de la Societo

POŝTMARKO KUN ESPERANTA TEKSTO

(IGS/659) Praha. — La Ĉeĥoslovaka Ministerio de Poŝto ĵus emisiis la 49-an poŝtmarkon de la mondo kun teksto en la Internacia Lingvo. La okazo de la eldono estas la Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj en Praha en 1968, kiun la Ministerio jam nun reklamas per

serio de sep dulingvaj markoj. Sur la 5-kolora marko de valoro 5 Kčs aperas teksto en la ĉeĥa lingvo kaj en Esperanto. La poŝtmarko aperas en speciala aranĝo kiel folieto po kvar markoj kun meza kupono.

Esperanto estos vaste uzata tra la mondo, kiam multaj neesperantistaj organizaĵoj, oficejoj kaj institutoj komencos apliki ĝin. Nun ni iagrade sukcesis atingi tian pozicion ĉe la radio. Pli ol dudek radiostacioj regule disaŭdigas programojn en la Internacia Lingvo. Tio okazas ne pro la deziro de la estroj de tiuj stacioj helpi la disvastigadon de Esperanto, sed pro tio ke ili estas konvinkitaj ke per nia lingvo i'iaj programoj estos aŭskultataj en multaj landoj.

La prizorgantoj de la Esperanto-radiodisaŭdigoj klopodas ekscii la efikon de iliaj disaŭdigoj. Ili atente legas ĉiujn senditajn al ili leterojn de radioaŭskultantoj. Se la leteroj estas malmultaj oni opinias ke ankaŭ la aŭskultantoj ne estas multnombraj. Tiam sekvas decido pri pli maloftaj disaŭdigoj en tiu lingvo, eĉ ĉesigo de la disaŭdigoj. Pasintjare la ĉeta kaŭzo por nuligo de la Esperanto-disaŭdigoj de Radio Bern estis ĝuste tiu kaŭzo. La sendo de amasaj protestaj leteroj flanke de la esperantistoj igis la gvidantojn de la radiostacio renovigi la Esperanto-radiodisaŭdigojn. Jen pro kio estas dezirinde, ke ni ne nur regule aŭskultadu la Esperanto-dissendojn, sed ankaŭ kelkfoje en la jaro sendu leterojn per kiuj ni konfirmu la aŭskultadojn.

Antaŭ tri jaroj mi aĉetis bonkvalitan radioaparaton produktitan en Germana Demokratia Respubliko. Per ĝi mi sukcesis kapti kaj aŭskultadi regule aŭ sporade la Esperanto-disaŭdigojn de dek

radiostacioj. Al ĉiuj minimume dufoje en la jaro mi sendas leterojn. En ili mi skribas pri la aŭskulteblecoj en diversaj sezonoj, pri parazitaj bruoj, komentas la programerojn k. a. Tamen neniam mi forgesas, ke la ĉefoj de la radiostacioj ne estas esperantistoj kaj ne interesigas pri la disvastigo de Esperanto. Pro tio mi nek turnas min al ili skribante „Kara Samideano“, nek mi insistas ke ili disaŭdigu neŭtralajn programojn.

De tempo al tempo mi invitas gesperantistojn aŭskulti Esperanto-disaŭdigojn en mia hejmo. Post la aŭskultado ni sendas leteron al la radiostacio, subskribitan de ĉiuj aŭskultantoj.

Lastatempe mi komencis registri sur magnetofono aŭ bendo fragmentojn de bone aŭskulteblaj kaj interesaj Esperanto-disaŭdigoj. Ilin mi disaŭdigas en kunvenoj de la Esperanto-societoj en Sofia. Rezulto de tio estas la ekinteresiĝo de multaj ĉeestantoj aŭskulti la Esperanto-radiodisaŭdigojn kaj sendado de kolektivaj leteroj al la radiostacioj, kiuj estas subskribitaj de multaj personoj.

Nun, kiam ni estas ĉe la sojlo de la Nova Jaro oni plej ofte reorganizas la disaŭdigojn kaj la programojn de la radiostacioj. Per ekspedo de multaj leteroj al la radiostacioj, kiuj disaŭdigas en Esperanto, ni helpu por ke nia lingvo havu pli bonajn poziciojn en la radio.

Nik. Nikolov

Fakdelegito pri turismo kaj sporto

GRAVA INFORMO PRI RUMANIO

En Oradea, limurbo apud Hungario kun 120 mil loĝintoj, fama pro dakuraclokoj kontraŭ reŭmatismo kaj rakito, plue turisma fokuso, troviĝas Esperanto-interpretisto en la granda hotelo kaj restoracio „Transilvania“



ANTAŬ OL KOMENCI LA KURSON

de *Andrzej Pettyn*

La problemo kiel komenci la kurson de E., kiel daŭrigi la instruadon por atingi sukceson, fariĝas ĉiam pli grava, ĉar ĉiujare okazas pli kaj pli multe da kursoj. Evidentiĝis, ke pro manko de kvalifikitaj kursgvidantoj, multajn el inter la diritaj kursoj gvidas esperantistoj, tre entuziasmaj, sed bedaŭrinde ne plene preparitaj al la instruado *lingve* kaj *metodike*. Ĉar la kursgvidanto estas plej ofte la unua esperantisto kun kiu kuntuŝiĝas la kursano kaj liaj metodo kaj konduto plejparte decidas pri la plena *aliĝo* aŭ *nealiĝo* de la kursano al la movado kaj pri la *plua interesiĝo* pri E-problemaro, mi permesas al mi direkti al la novaj, freŝbakitaj kursgvidantoj kelkajn konsilojn.

Alta nivelo de preskaŭ ĉiu E-kurso grandparte dependas de ĝusta *aranĝo* kaj *antaŭpreparo* de la instruado fare de kursgvidanto. Ĉiu kursgvidanto devas konscii pri la neceso *plani* sian laboron. La planado konsistas en la *determino de celoj*, al kiuj oni strebos, en la divido de la instruado je *unuopaj etapoj* kaj pripenso de *rimedo*j kaj *metodikaj artifiko*j utiligendaj por atingi la fiksitajn celojn. Ĉe la planado oni devas preni en konsideron la instruprogramon de E., kiu estas kvazaŭ *gvidfadeno* de ĉiu instruisto. Analizante la instruprogramon kaj planante diversajn rimedojn por ties realigo, oni devas pripensi elekton de *lernolibro*, elekton de *kompletigaj legolibroj*, *helpaj instruiloj*. En nia plano ni ne povas preterlasi la partoprenon de la kursanoj en la esperantista vivo de la klubo aŭ societo, la partoprenon en diversaj esperantistaj solenaĵoj kaj kampanjoj, kiu pli firme ligas la kursanojn al la movado.

Ĉar la plimulto de la kursgvidantoj bazas sian instruadon sur lernolibro, estas rekomendinde, ke oni konatiĝu kun ĉiuj lernolibroj disponeblaj en la lando, kaj — se tio estas ebla — kun kelkaj pli bonaj lernolibroj diverslandaj. Ĉiu E-instruisto *rajtas* kaj *devas* elekti tiun lernolibron, kiu — laŭ la vidpunkto de la aplikita metodo — pleje taŭgas por la koncerna kurso. Decidante pri la elekto de tiu aŭ tiu lernolibro oni devas preni en konsideron la *aĝon* kaj *seksan* de la lernantoj, ilian *edukitecon* kaj konon de fremdaj lingvoj, la *profesian medion*, el kiu ili devenas, la nombron da *instruunuoj* destinitaj por la tuta kurso, la *ofiecon* (en semajno) kaj *longecon* de la instruunuoj ktp. Nur post pripenso de ĉiuj menciitaj faktoroj oni elektas lernolibron.

Inter la esperantistoj troviĝas kursgvidantoj, kiuj *neglektas lernolibron*, subtaksas ĝian valoron tre ofte instruante entute sen lernolibro. Laŭ mia opinio ili faras gravan *eraron*, ĉar la lernolibro plenumas utilan *servan rolon*. Ĝi ne nur disponigas diversspecajn *dialogojn*, konversaciajn *tekstojn*, skribajn aŭtomatigajn *ekzercojn*, sed ankaŭ rememorigas, ordigas kaj formigas la *scion* akiritan dum leciono. La lernolibro tre ofte servas ankaŭ por *memstara lernado*, kiam la lernanto ne povas ĉeesti la lecionon. Kompreneble ĉio ĉi ne signifas, ke la kursgvidanto estu *sklavo* de sia lernolibro kaj instru, frazon post frazo, fidele laŭ la sinsekvo de la lernolibra materialo. Ne! Tiel instrui oni ne nur ne povas, sed eĉ ne rajtas! Se oni tiel instruos en la kurso, iu povas ekhavi la suspekton, ke la instruisto konas la lingvon je la proverbiaj tri lecionoj pli, ol la kursanoj. La kursgvi-

danto estu *inventema* kaj laŭbezone, jen tiel jen tiel, enkonduku *novan materialon*, sed ne sekvu *blinde* la lernolibron!

Multaj instruistoj — por montri al la lernantoj sian altan lingvokonon — emas *senĉese dikti*, anstataŭigi la lernolibron per notaĵoj aŭ diktaĵoj. La diktaĵoj povas la lernolibron kompletigi, sed ne anstataŭi. Eĉ ne sufiĉe bona lernolibro estas pli utila ol diktitaĵoj, kiuj ja ĉiam *forprenas multan tenon*, kelkiam kaŭzas *miskomprenojn* kaj *eĉ erarojn*, kaj povas influ *mal-korektan alproprigon* de iu gramatikaĵo. Resume: *kompletigu la lernolibron nur laŭbezone kaj laŭnecese*.

Ekde la unuaj lecionoj valoras kutimigi la kursanojn al *legado* de E-gazetoj kaj libroj. Tial — oni nepre devas noti tion en la instruplano — estas rekomendinde entrepreni iom-post-ioman *legadon* de facilaj *tekstoj* dum kaj ekster la lecionoj (mi pensas pri t. n. „pontlegaĵoj“). Krome estas rekomendinde utiligi dum la lecionoj esperantlingvajn prospektojn k. s. La legado de ĉiuj ĉi tekstoj, ofte kun iom pli vasta vortoprovizo, postulas paralelan enkondukon de *E-vortaroj*, kion tamen oni ne faru tro *frue*, ĉar la ampleksaj vortaroj malhelpas koncentrigi sur la fundamenta vortoprovizo.

Antaŭ ol komenci la kurson oni devas prizorgi diversajn *instruhelpilojn*, al kiuj i. a. apartenas *diversspecaj tabuloj, grafiaj kartoj* (la kursanoj korespondos kaj la kartoj estos necesaj por ĝuste kompreni leteron aŭ kompletigi informojn, *bildoj, portretoj, fotografaĵoj*). Ili servas por prezenti la vivon en aliaj landoj, por konigi al la kursanoj la plej glavajn eventojn de la movado — Universalaj Kongresoj, Zamenhof-monumentoj, Esperanto-stratoj, diverskampaj aktivecoj ktp. Estas uzeblaj fotografaĵoj, kiuj povas esti simple eltranĉitaj el E-gazetoj, kiujn oni povas projekcii per epidiaskopoj. Epidiaskopoj estas uzenda sur ĉiuj ŝtupoj de la in-

struado — variigas lecionon, faras ĝin pli vigla; ankaŭ sonfilmo. Bedaŭrinde ne estas multaj E-filmoj, sed kial ne utiligi tiujn, kiuj ekzistas? Ekz. bulgaraj „Nesebr“, „Gastama Maro“, „48-a UK en Sofio“, „Bulgara somero“ — eksterlande oni povas ilin ricevi pere de bulgaraj ambasadoj. Sekve, gramofono kun diskoj; ĝi povas servi por la instruado de *korekti elparolo*, same la *kantoj*. Jam baldaŭ oni povos uzi la preparatan en Pollando diskokurson de E-o. Utilas *radioricevilo* por aŭskulti radioelsendojn en E-o, kiujn oni povas ankaŭ surbendigi kaj reaŭdigi en la kursejo, utilas *magnetofono*, tre rekomendinda des pli, ke estas tute facile ricevi altnivelajn surbendigaĵojn ĉe la Magnetotona Servo de UEA. La uzon de ĉiuj ĉi instruhelpiloj oni devas antaŭvidi kaj pripensi antaŭ la komencigo de la kurso, por ke ni povu ĝustatempe apliki ilin.

Fine venas momento de la *disdivido* de la lingvomaterialo fiksita en la instruprogramo je *unuopaj metodikaj unuoj* (metodika unuo estas parto de la programmaterialo, kiu konsistigas unu temon konversacian, legan aŭ gramatikan). Ĉe tiu ĉi divido ni devas nin gvidi per la samaj kriterioj, kiel ĉe la elekto de lernolibro — aĝo, sekso, edukiteco ktp. En nia plano ni ne forgesu pri la lecionoj dediĉotaj por la *ripetado, sintezado kaj ordigado* de la akirita scio, ni destinu iom da tempo por la *historio* de la E-movado kaj *literaturo* kaj ankaŭ por informoj pri la aktualaj iniciatoj kaj atingoj. Jen, tiel ni prilaboras la ĝeneralan planon de la instruado en la kurso, kiun ni *dividas* — por pli bone plani nian laboron — je *monatoj*. Kaj laŭ tiu ĉi plano ĝenerala ni devos prilabori *planon detalan por ĉiu unuopa leciono*. Oni povas do facile rimarki, ke ĉiu celkonscia kursgvidanto *antaŭ ol komenci la kurson* devas *multon pripensi* kaj *bone sin prepari al la instruado*, por ke ĝi estu laŭeble sukcesa. Ofta neglekto de tiu



ĉi tasko estas unu el la *bazaj kaŭzoj* de la *tiom multe priplorata forfalado* de la E-lernantoj el niaj kursoj, aŭ de *nesufiĉa lingvoekkono post kurso*, kiu

ne permesas *plian memstaran praktikadon de la lingvo*.

El „*Pola Esperantisto*“, № 2,
marto-aprilo 1967

LA SOCIETA VIZITKARTO

La propagando de Esperanto kaj ties movado estas diversmaniera. Ni gas laŭ la lokaj kondiĉoj, niaj fortoj kaj eblecoj, aranĝante: ekspoziciojn, Esperanto-tagojn kaj semajnojn, prelegojn kaj ekskursojn, ni pendigas murgazetojn kaj afiŝojn por malfermo de novaj kursoj k. a.

En preskaŭ ĉiuj bulgaraj urboj kaj eĉ en multaj vilaĝoj, ties loĝantoj kaj preterpasantaj vojaĝantoj ofte vidas „la vizitkarton“ de la loka Esperanto-societo — tio estas ĝia montrokesto. Tiajn propagandajn kestojn mi havis la okazon vidi en: Sofia, Plovdiv, Ŝumen, Varna, Burgas, Jambol, Mezdra, Smoljan kaj Kazanlâk. Ili estis firme fiksitaj sur muroj de ĉefstratoj kaj placoj, apud aŭtobushaltejoj aŭ sur la fasadoj de Esperanto-klubejoj, hoteloj kaj stacidomoj. La plimulto de la materialoj ekspoziciitaj en la kestoj estis lerte, alloge kaj kun gusto aranĝitaj. Oni tuj povis konstati ke la aranĝantoj estas profesiaj aŭ amatoraj pentristoj aŭ oni serĉas helpon de tiaj personoj.

Vere la montrokesto de niaj societoj similas vizitkartojn. Pere de ili oni povas ekkoni la agadon kaj la vivon de la lokaj Esperanto-societoj. Plej ofte en unu montrokesto, krom la titolo de la societo oni vidas ekspoziciitajn: fotojn el la societa vivo, Espe-

ranto-prospektojn, revuojn kaj librojn, interesajn poŝtkartojn kaj kovertojn, planon por agado de la societo kaj liston de lokaj aktivaj esperantistoj, kiuj deĵoras en vizitataj de la publiko lokoj kaj ejoj. La klarigtekstoj estas en bulgara lingvo, ĉar oni klopodas varbi por nia movado novajn adeptojn inter la loĝantaro.

La materia'ojn en la montrokesto oni sangas plej ofte unufoje en la monato. Parto de la ornamaĵo estas konstanta. En iuj loĝlokoj oni speciale ordigas la montrofenestrojn okaze de grandaj festotagoj kaj ditrevenoj.

Por ke la ekspoziciitaj materialoj ne estu difektitaj de la sunradioj plej ofte la montrokesto estas fiksita sur nordaj aŭ okcidentaj muroj. Oni ankaŭ havas antaŭvide ĉu estas tegmento sur la elektita loko por pendigo de montrokesto. Tiaj lokoj havas avantaĝon, ĉar la pluvo ne povas endanĝerigi la ekspoziciitan materialon.

Ĉiu Esperanto-societo devas havi minimume unu bone prizorgitan montrokeston. La montrokestoj tagnokte propagandas por Esperanto kaj rememorigas al la loĝantaro, ke en ilia loĝloko funkcias societo, kiu strebas konvinki ĉiujn homojn ekregi krom la gepatran ankaŭ la internacian lingvon.

N. N.

BIBLIOTEKO KATALOGIS ESPERANTO-LITERATURON

(IGS/656) Szeged, Hungario. — La Hungarlanda Esperanto-Biblioteko en Szeged ĵus eldonis sian, 288-paĝan katalogon laŭ la Universala Decimala Klasifo. La Biblioteko, fondita en 1960, estas administrata kiel parto de la Biblioteko Somogyi. La tri plej grandaj Esperanto-bibliotekoj de la mondo estas tiuj de la

Nacia Biblioteko en Vieno, de la Brita Esperanto-Asocio en Londono kaj de la Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam. Aliaj relative grandaj kolektoj troviĝas en Amsterdam, Berlino, Buenos Aires, Montevideo, Praha, Stokholm kaj Tokio.

Dank' al miaj travivaĵoj en Bulgario, mi nun provas klarigi la esencajn diferencojn inter la bulgara kaj franca esperantistaj movadoj.

Unue mi ĝenerale povis konstati ke la bulgara esperantista movado estas multe pli forta ol la franca.

En Francio la vivo en la urbaj grupoj estas kvazaŭ nula. La esenco de la aktivecoj estas la Federaciaj Kongresoj, kiuj okazas ĉiujare kaj kiujn principe preparas la Nacia Kongreso, kiu ankaŭ okazas ĉiujare. Sed tiuj Kongresoj restas ankoraŭ tro ofte nur tre agrablaj kunvenoj, kie oni povas renkonti malnovajn amikojn kaj babili... ĉefe france!

Tamen mi devas diri ke ekde 5 aŭ 6 jaroj oni komencis instrui la lingvon sufiĉe ofte en la lernejoj por estontaj instruistoj kaj tiuj gejunuloj komencis organizi post la Kongresoj mem sufiĉe valorajn varieteajn programojn, kaj tio praktikigas la lingvon.

Ankaŭ tiu nova intereso flanke de la junularo al Esperanto, kondukis al iom organizita Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), kiu okazigis sian unuan naciajn kvazaŭ kongreson dum marto 1967 en „Grésillon“. Tie ĉeestis ĉirkaŭ 23 gepartoprenantoj, kiuj pagis la aligilon.

Mi devas diri ion pri „Grésillon“. Grésillon estas „franclanda esperantista kastelo“; ĝi estis aĉetita de esperantistoj (post la Dua Mondmilito), kiuj pruntedonis monon kaj nun ĉiujare oni organizas

(dum kristnaskaj, paskaj, someraj ferioj) kursojn (periodojn) por komencantoj aŭ por aliaj esperantistoj. Mi aldonas, ke ĉiam tiuj provperiodoj estas plensukcesaj dank' al la sindonemo de la geprofesoroj (de Esperanto) kaj dank' al tio ke en Grésillon oni sentas sin vere en Esperantio. Tiel ekde 5 jaroj estas organizita dum la Paskaj ferioj „Kultura Semajno“: ĉirkaŭ 30 komencantoj venas el tuta Francio por lerni senpage la lingvon; tion konsistigas la so'a (sed bonega) helpo fare de la ŝtato.

Nu, la ĉefa tasko de Franca Esperanto-Movado tiujare, estas preparado de la 3-a STELO-Kongreso, kiu okazos en aŭgusto 1968 en Aix-en-Provence apud Marsejlo (Marseille); kaj mi konsilas ke ĉiuj bulgaraj esperantistoj profitu la okazon por viziti Francion.

Post komparo de la Franca organizaĵo kun tio kion mi eksciis pri la bulgara, mi konkludas, ke la ĉefa forto de la bulgaraj esperantistoj estas ke ili laboras serioze. Mi scias ankaŭ ke la francaj esperantistoj tro ofte estas esperantistoj nur ĉar ili bezonas amuziĝi iom originale. Ke la aktivaj francaj esperantistoj, pardonu min, tio estas vere ankoraŭ nun — sed ni ĉiuj pravus esperi ke iom post iom, seriozeco de la novaj junaj esperantistoj helpos al vera forta konstruado de la Movado ankaŭ en Francio.

26. 9. 1967 *Mari-Hélène Bourdier*

INFORMA BULTENO DE LA FOIRO EN BRNO, junio 1967, kun jena enhavo: Internacia Foiro en Brno 1967; scienco kaj tekniko en la Internacia Foiro de Brno 1967; la VI-a internacia redaktora konferenco de la teknika gasetaro; oraj medaloj de IFB; entreprenoj de la ĉeĥoslovaka eksterlanda komerco

en la foiro de Brno; ĉu vi volas motocross — motorciklon Jawa /čz!; koncize pri urbo Brno; Brno — urbo de traktoroj; Brno — urbo de Mendel; Brno — unu el la luliloj de Mezeŭropa Esperanto-Movado; la Sudmoravia regiono — granda ĝardeno de Meza Eŭropo; perloj de la ĉirkaŭaĵo de Brno.

Ĉi-jare de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto okazis la tradicia BET-9 (IX Balti Studenta kaj Junulara Esperanto-Tendaro). La tendarloko estis en Litovio ĉe vilaĝo Kaltanenai, sur la bordo de lago Ĵejmena. La tendaron partoprenis 150 gejunuloj el diversaj lokoj de Sovetunio kaj el eksterlando. En antaŭaj BET-oj neniam kolektiĝis tiom multe da juuuloj. Pli ol 100 getendaranoj partoprenis BET-on la unuan fojon. Tio montras, ke dum la lasta tempo intereso al Esperanto inter sovetia junularo rimarkinde pligrandiĝis.

Tre grandan preparan laboron faris litovaj geesperantistoj, precipe la tendarestro Vitas Ŝilas. Malgraŭ embarsoj, kunligitaj kun anticipaj aferoj, la rezultoj estis pli bonaj ol la atenditaj. Por la tendaro estis preparitaj specialaj insignoj, belaj kultukoj kaj kantaretoj „Junularo kantas“, pere de kiuj ni ellernis multajn belsonajn kantojn en Esperanto.

La tendaro aspektis tre bele. Logis ni en tendoj, kiuj staris inter arboj sur la lagbordo. Apude estis sufiĉe granda arbarkampo, en la centro de kiu staris alta masto kun verda Esperanta flago, kaj ĉirkaŭe pendis sloganoj: „Saluton en amika rondo!“, „Ni pruvu la forton de Esperanto!“, „Ni havas komunan lingvon!“.

La programo de la tendaro estis treege vasta kaj varia. Estis organizitaj specialaj E-kursoj por komencantoj, kiujn gvidis rigano Ervin Mozerts. Li speciale por tio konstruis magnetofonan sistemon, per kiu oni povas samtempe instrui sep homojn. La unuan fojon en Sovetunio okazis seminarioj de E-junularaj aktivuloj. Dum tiuj seminarioj, gviditaj de Anatolij Gonĉarov el Barnaul, oni pridiskutis gravajn demandojn de junulara E-movado en Sovetunio: pri studenta agado, pri propagando de Esperanto, pri novaj metodoj de la instruado, pri laboro de

klubo ktp. Tiu interŝanĝo de sperto, rakontoj pri progresoj kaj evitendaj eraroj, laŭ opinio de ĉiuj geseminarianoj, devas doni abundajn fruktojn.

Kelkfoje al ni venis gastoj; inter ili estis ankaŭ reprezentantoj de polaj kaj hungaraj junaj esperantistoj, kiuj rakontis al ni pri la agado de siaj organizaĵoj kaj amike salutis nin je ilia nomo.

En la tendaro estis organizita ankaŭ E-ekspozicio. Ekspoziciaĵojn por ĝi donis E-klubo de Vilnius, Birsk kaj Riga. Tiuj ekspoziciaĵoj el ĵurnaloj kaj fotoalbumoj, kiuj k ŝis grandan intereson kaj konstante estis rigardataj de iu ajn.

Funkciis la tradicia Somera Universitato. Ĝiarektoro, instruisto de la Vilnusa Universitato Algimantas Skupas, kiu estis dum duonjaro en Francio, tre interese rakontis pri siaj impresoj. Instruisto Boris Kolker el Birsk prelegis pri problemoj de internaciaj lingvoj kaj interlingvistiko. Moskva ĵurnalisto Aleksandr Harkovskij faris du prelegojn: pri la fama E-poeto Vasilij Jeroŝenko kaj pri Esperanto kiel estonta lingvo de la scienco.

Ne estis forgesitaj ankaŭ amuzoj. Tage ni sunbruniĝis, naĝis en la lago, kaj vespere kolektiĝis ĉe lignofajro, kie aŭ iu delegacio donis koncerton, aŭ ni simple kantis, dancis, ludis, aŭskultis magnetofonon. Estis ankaŭ koncerto por la lokaj loĝantoj, kiu havis grandan sukceson. Okazis literatura vespero, dum kiu oni povis aŭskulti ne nur originalajn esperantaĵojn en bona prezentado, sed ankaŭ verkojn de sovetiaj verkistoj, tradukitajn de getendaranoj mem. Estas menciinda ankaŭ la tendara olimpiado, dum kiu oni konkursis en malpeza atletiko, naĝado kaj orientado. En la fino de la tendartempo ĉe lignofajro okazis gaja karnavalo kun premioj por la plej bonaj kostumoj kaj

kun elekto de „Miss kaj Mister Esperanto“.

Dum la lasta ĝenerala kunveno oni akceptis gravan decidon. Ĉar antaŭajn BET-ojn iniciatis, preparis, gvidis kaj aktive partoprenis junularo ne nur el Baltaj, sed ankaŭ el aliaj Sovetaj respublikoj, do estas jam nerefutebla tiu fakto, ke la titolo BET plu ne respektas plene la tendarojn laŭ enhavo. Pro tio ni unuanime decidis ŝanĝi la nomon BET al SEJT (Soveta Esperan-

tista Junulara Tendaro), konservante la antaŭan numeradon. Do, nia tendaro ekhavis la novan nomon SEJT-9. Estis decidite, ke SEJT-ojn rajtas partopreni ne nur junularo (ĝis 30 jaroj), sed ankaŭ pli aĝaj esperantistoj, kiuj aktive kontribuas la junularan movadon. Sekvonta tendaro, SEJT-10, okazos en Azia parto de Sovetunio, plej probable apud la lago Teleckoje.

Viktor Arolovič

ESPERANTISTA RENKONTIGO EN UZBEKIO

Mi deziras rakonti koncize kiel pasigis la esperantistoj el Hungario, Pollando kaj GDR la tagojn de la esperantista renkontigo en Uzbekio, kiun organizis Esperanto-Komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio.

Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi jaro, rilate al la esperantistaj renkontigoj, ĉu en plej alta nivelo — Universala Kongreso, ĉu en la plej malalta — Uzbekia Esperantista Tendaro, havis multajn malfacilaĵojn. La unua, sekve de la militkonflikto en la Proksima Oriento kaj la dua, sekve de la kapricoj de la mezazia naturo. Sed feliĉe, ambaŭ iniciatoj finfine estis feliĉe solvitaj kaj plene sukcesis.

Multaj memoras, ke 2-a Uzbekia Esperantista Tendaro devis okazi en la regiono de loĝloko Ĥamzaabad, kiu troviĝas en la montaro ĉirkaŭanta la florantan valon de Fergana, sed la postsekvoj de la printempaj inundoj malebligis la efektivigon de la tendaro tie. Pro tio, la Respublika Konsilantaro kaj la Prezidentaro de la Amikeca Uzbekia Asocio proponis al ni alian lokon kaj ioman prokrastigon de la limdato de la tendaro. Do, estis proponita la loko Aktas. La membroj de nia Esperanto-Komisiono, aktivuloj-gejunuloj multon kontribuis por la aranĝo de la tendaro. Estis dissenditaj multaj invitiloj. Ni invitis ankaŭ la respondecan Sekretariaron de la Tutunia Esperanto-Komisiono el Moskvo, k-dojn prof. E. Bokarev kaj A. Makovskij. Ŝajnis ĉio estas en ordo, ĉar restis 10 tagoj ĝis la komenco de la tendaro, sed... denove aperis natura obstaklo en la regiono de Aktas kaj la superaj instancoj de la Respubliko proponis prokrasti la tendaron por iom da tempo por translokigi la tendaron en alian lokon. Pro tio ni urĝe sendis al ĉiuj telegramojn pri la prokrasto de la tendaro... La telegramojn ni dissendis la 23-an — 24-an de aŭgusto, sed jam la 25-an de aŭgusto ni ricevis telegramojn de granda esperantista grupo el Glivice kaj de, eĉ pli granda grupo el Budapeŝto, ke malgraŭ ĉio, ili veturas kaj venos fine de aŭgusto en Taŝkent. Do, kion fari? Ne

estas eble rapide rearanĝi la tendaron en alia loko kaj ne eblis ankaŭ ĝin aranĝi en Aktas. Tiam Esperanto-Komisiono sin turnis al la Prezidio de Uzbeka Amikeca Asocio, petante konsilon. La prezidantino de la Asocio, k-dino Ŝukurova konsiliĝinte kun la membroj de la Prezidio, sin turnis al la Registaro de Uzbekio, komprenigante ke jam la esperantistoj estas survoje al Taŝkent, ke la tendarlokone ne estas eble rearanĝi en ia ajn alia loko, ĉar restis tre malmulte da tempo. La registaro de la Respubliko kaj aliaj sociaj organizaĵoj, komprenante la gravecon de nia aranĝo, decidis kontentigi ĉiujn alvenontajn geesperantistojn per la aranĝo de turista vojaĝo tra la plej interesaj lokoj de Uzbekio kaj donis por efektivigo de tiu ĉi vojaĝo 10,000 rublojn, proponante, ke eĉ ne unu esperantisto elspezu por la turista vojaĝo sian monon. Do, la ŝtato prenis je sia kosto ĉiujn elspezojn por la akcepto de ĉiuj alvenontaj geesperantistoj kaj proponis al la Uzbeka Amikeca Asocio kaj Esperanto-Komisiono, ke oni ellaboru 8-tagan programon. Tiu ĉi proponon ni akceptis kun granda plezuro kaj danko, ĉar ĝi estus ĝusta solvo de la problemo. Ŝajnas al mi, ke unuan fojon en la historio de internaciaj esperantistaj renkontigoj, la ŝtato prenis sur sin ĉiujn elspezojn por 8-taga turista vojaĝo de ĉirkaŭ 150 eksterlandaj geesperantistoj.

La alvenintaj geesperantistoj loĝis en Taŝkent kaj Samarkand en luksaj hoteloj, ili estis priservitaj en plej bonaj restoracioj kaj dum la tuta tempo de la vojaĝo ili estis transportitaj per specialaj turistaj aŭtobusoj, kiuj estis je ilia dispozo, tage kaj nokte. La partoprenintoj konatiĝis kun nia ĉefurbo Taŝkent, vidis la postsekvojn de la tetura tertremado, kaj vidis, ke ĉiuj Respublikoj de Sovetunio helpas al taŝkentanoj reakiri loĝejojn. Ili vidis multajn domojn, kiuj estas konstruitaj jam post la tertremado, ili vidis centojn da „gruoj“, kiuj formas ŝtalan arbaron en la centro de la ĉefurbo, helpantaj konstrui diversajn konstruaĵojn. La



Estraro de la taŝkenta tekskombinumo invitis ĉiujn geesperantistojn al sia Palaco de Kulturo. En la kombinumo laboras pli ol 20,000 gelaboristoj. Oni solene akceptis la geesperantistojn, salutinte ilin en la nomo de ĉiuj loĝantoj de la urbo, kaj la gvidantoj de la esperantistaj grupoj salutis la ĉeestantajn gelaborulojn en Esperanto, montrante la utilecon de la Internacia Lingvo. Poste, la amatoraj artaj grupoj de la Palaco de la Kulturo prezentis kantojn kaj dancojn de Uzbeka popolo, kaj siaflanke la geesperantistoj kantis esperantlingve, hungare kaj pole kaj prezentis kelkajn dancojn de siaj popoloj. La Direkcio de la Tekskombinumo donacis al ĉiu esperantisto kaj esperantistino po unu bela tuketo, kiuj estas produktitaj okaze de la 50-jara datreveno de Granda Oktobra Socialisma Revolucio. En Taŝkent ĉiuj partoprenintoj ekskursis al diversaj partoj de la urbo, vidis ĝiajn novan kaj malnovan parton, la ekzotikon de la orienta bazar, la ekspozicion, kiu montras la evoluon de la uzbeka nacia kulturo, industrio kaj kamparmastrumo. La 2-an de septembro, ĉiuj veturis al la nova urbo Almalik, kiu troviĝas en la montaro kaj kie estas konstruita granda uzino por fandi kupron. La Estraro de la Urba Konsilantaro kaj la Direkcio de la Kupra Uzino invitis ĉiujn geesperantistojn al la restoracio kaj regalis ilin per bongusta tagmanĝo. Post la tagmanĝo ĉiuj iris al la Urba Teatro, kie spektis la arton de Uzbeka popolo kaj denove eksonis de la podio — Esperanto en la kantoj de la geesperantistoj kaj en la paroloj de la gvidantoj de la esperantistaj grupoj.

La 3-an de septembro la partoprenintoj veturis al kolĥozo kie rigardis vastajn kotonkampojn, deŝiris, por memoro, po kelke da kotonburĝonoj. La Prezidanto de la kolĥozo, mezaĝa viro, diplomita agronomo, respondis al multaj demandoj kaj siaflanke, miris pri tio, ke reprezentantoj de diversaj popoloj parolas la saman lingvon kaj ni rakontas al la kolĥozanoj pri la deveno de la internacia lingvo kaj pri ĝia utileco. La vizitintoj vidis, kiel oni akvumas la kotonkampojn, kiel per aeroplanoj oni disŝutas super la kamparo specialajn kemiaĵojn por senfoliigi la kotonarbustojn, por ke la kotonrikoltantaj maŝinoj havu la eblecon kolekti puran kotonvaton. La saman vesperon en la freŝa aero de la kolĥoza fruktĝardeno, sur platformo, konstruita super la granda kanalo, la estraro de la kolĥozo preparis bonegan vespermanĝon. Ne mankis bongustaj uzbekaj naciaj manĝaĵoj, diversaj fruktoj, vinbero ĉiaspeca, melonoj kaj akvomelonoj. Oni kantis naciajn kaj esperantajn kantojn. La geesperantistoj kaj la kolĥozanoj dancis diversajn dancojn.

La 4-an de septembro, frumatene, la partoprenintoj forveturis al Samarkand, kiu en la jaro 1971-a festos sian 2500-jaran jubileon.

Survoje ni vizitis sovĥozon „Paŝtakor“, kie jam estis preparita bongusta tagmanĝo. La geesperantistoj regalis la gastigantojn per amatora koncerto, antaŭ kiu okazis mitingo de la amikeco kaj denove eksonis Esperanto kaj denove ni komprenigadis al la tieaj loĝantoj kio estas Esperanto kaj ĝian taŭgecon en la internaciaj rilatoj.

La saman vesperon ni alvenis en Samarkand. Denove klopodoj kaj zorgoj pri rapida enloĝigo. Post la vespermanĝo ĉiuj disiĝis por ripozi.

La 5-an de Septembro ni komencis trarigardi la antikvajn monumentojn: la observatorio de mezepoka mezazia sciencisto Ulugbek, la antikva musulmana tombejo Ŝaĥi Zinda, la majestaj restaĵoj de moskeo Bibi-Ĥanâm, konstruita honore al la kruela Timur kaj pri kies konstruo ekzistas pli ol mil legendoj, la placo Registan, kiu estis la centro de mezepoka Samarkand kaj kie staras majestaj musulmanaj altlernejoj kaj la ĉefverko de la mezepoka islama arkitekturo, maŝzoleo „Gur Erir“, kie estas entombigitaj Timur. lia filo Ŝaĥruĥ, la granda Ulugbek kaj aliaj timuridoj.

Post la tagmanĝo multaj veturis al la opera teatro. Aliaj vagadis tra la stratoj. La saman tagon je la 5-a posttagmeze, ĉiuj veturis al la granda silkfabriko, kie okazis mitingo de la amikeco kun malgranda koncerto. Multmila kolektivo de la fabriko kore kaj amike salutis la geesperantistojn kaj la fabrikestraro donacis al la gastoj silkajn tuketojn, kiuj havis nacian ornamon.

La 6-an de septembro oni veturis al la Sciencesplora Instituto pri la bredado de astrakanaj ŝafoj kaj produktado de astrakanaj feloj kaj al la Sciencesplora Instituto pri la plantado de vinbero, kie oni regalis la gastojn per diversspeca vinbero.

Post la tagmanĝo oni invitis nin al granda tefabriko kaj ni rigardis la produktadon de diversspecaj teoj. En la ĝardeno de la fabriko estis starigitaj tabloj sur kiuj troviĝis diversaj fruktoj, sukero, bombonoj kaj oni proponis al ni gustumi diversajn specojn de teo. La direktoro de la fabriko rakontis al ni ĝian historion kaj klarigis, kiel oni devas kuiri la teon laŭ uzbeka maniero. Post la tetrinkado okazis internacia mitingo kaj koncerto. Ĉiuj gastoj ricevis po du kestoj de verda kaj nigra teo. Multaj gelaboristoj promesis lerni Esperanton.

La 7-an de Septembro ni revenis en Taŝkent, kie Uzbeka Amikeca Asocio aranĝis solenan tagmanĝon. La Prezidantino de la Asocio k-dino Ŝukurova dankis al ĉiuj pri tio, ke ili venis en Uzbekion. Sekvis dankvortoj de la reprezentantoj de hungaraj, polaj kaj germanaj geesperantistoj. Ili dankis al la Registaro de Uzbeka Respubliko, al la Uzbeka Amikeca Asocio kaj Esperanto-Komisiono pri la gastameco kaj gastigado.

Je la deksepa horo ĉiuj geesperantistoj for-

lasis Taŝkent kaj forveturis al Moskvo per rapida trajno. Kortuŝa estis la adiaŭo. Multaj ploris kaj promesis unu al la aliaj, ĉu korespondi, ĉu denove renkontiĝi.

Grandan signifon havis tiu ĉi esperantista renkontiĝo de propaganda vidpunkto, ĉar ne nur la superaj instancoj de la Respubliko konvinkigis pri la utileco de Esperanto, sed ankaŭ multaj simplaj homoj, nenion sciantaj pri Esperanto, eksciis pri ĝi kaj esprimis la deziron ĝin lerni. Ni esperas, ke la semoj plantitaj de

la eksterlandaj geesperantistoj, ne perdiĝos, sed donos rikolton. Nun estas tasko de la taŝkentaj geesperantistoj flegi tiujn esperantajn plantojn. En la nomo de la Esperanto-Komisiono, ni kore dankas al ĉiuj partoprenintoj en la renkontiĝo kaj petas, ke oni sendu al ni fotojn faritajn dum la renkontiĝo kaj se oni aperigos artikolojn en la esperanta kaj nacia gazetaro, bonvolu ankaŭ sendi al ni po du ekzempleroj. Ni antaŭdankas al ĉiuj sendontoj.

Petro Poliŝĉuk

PROFITU LA OKAZON!

Kvar propagandaj poŝtkartoj kun konvenaj desegnaĵoj kaj tekstoj en Esperanto kaj bulgara lingvo kaj kartona ŝildeto „Esperanto parolata“ estas vendataj en la librovendejoj de Bulgara Esperantista Kooperativo po du stotinkoj unu ekzemplero.

La eldoninto liveros la poŝtkartojn kaj la ŝildeton nur po unu stotinko la peco se oni mendos minimume 500 ekzemplerojn.

La metala insigno de la turistoj-esperantistoj, kiu ĝis nun estis vendata po 35 stotinkoj jam havas novan reduktitan prezon — 25 stotinkoj.

Mendojn oni direktu al: Turista Sekcio „Esperanto“, Poŝtenska kutija 45, Sofia. Aldonu 20 stotinkojn por registrita poŝtsendo!



USONA DESEGNO-FILMO KUN ESPERANTO-PAROLO

(IGS/655) Rotterdam. — La 52-a Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazis ĉi tie en aŭgusto, vidis inter aliaj filmoj en la Internacia Lingvo la premieron de 20-minuta kolora desegno-filmo de sendependa kalifornia TV-filmisto Richard Brace. La filmo, bazita sur desegnaĵoj de usonaj kaj japanaj lernejoj, rakontas pacifisman historion pri infanoj, kiuj malhelpas nuklean militon, sub la titolo „La tago, kiam infanoj interligis la manojn“ (angla eldono, „The Day the Children Held Hands“, kaj aliaj eldonoj rusa, ĉina, japana ktp. estas preparataj).

La 16-an de oktobro 1967 en Varna post dujara malsanado mortis

Slavka Mladenova Georgieva

(kun patra nomo Podskoĉieva), naskita en Kazanlák, 80-jaraĝa, edzino de la malnova E-pioniro Mladen Georgiev kaj patrino de Zora Mladenova Hans.

Niajn kondolencojn!



Bulgario

Tenĉo Andreev Jurukov (16-jara), str. Bato-lia 6, kv. „Vasil Kolarov“, Dimitrovgrad — kun la tuta mondo, interŝanĝas diskojn, PM, BK; interesiĝas pri fotografiaĵoj, moderna muziko kaj sporto.

Ĉeĥoslovakio

Václav Braun (38-jaraĝa fervojisto), Hradec Králove III SNP 605—kun bulgaroj, interŝ PK. Janega Viktor (instrusto), Ilava 34, volas interŝanĝi aboco-librojn en plej diversaj lingvoj.

Hungario

Francisko Dévay (10-jaraĝa), Boldogkövár-ralja — kun bulgaraj geknaboj pri BK, emblemoj kaj vivo en Bulgario.

USSR

Kvedaras Rimantas (kino-mekanikisto), str. Liepes 26-2, Šiauliai, Litovio — deziras korespondi kun tuta mondo, kolektas BK, PM kaj gramofondiskojn pri moderna muziko.

Ramanauskas Kestutis (15-jara) el Joniŝkelio eksp. ukis, Litovio — kun tuta mondo, interŝ. per poŝtmarkoj.

HONORE AL LA GRANDA OKTOBRO

Jam forpasis la tago, en kiu ĉiuj homoj de la tuta terglobo festis la 50-jaran datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

E-societo „Sukceso“ en Vraca ankaŭ preparis sin por celebri tiun datrevenon. Konekse kun ĝi la esperantistoj de la urbo kolektiĝis en kulturkleriga kunveno, je kiu k-do Radoslav Tričkov prelegis en Esperanto pri: „La mondhistoria signifo de la Oktobra Socialisma Revolucio“.

Post la prelego oni tralegis la entreprenojn de CK de BEA konekse kun la organizo de la 37-a nacia E-kongreso kaj la programon de la kongreso.

E. Daskalov

ANEKDOTO

Gabrovano, vizitinte urbon Veliko Târnovo sur unu el la stratoj demandis fiakriston:

— Kiom oni pagas ĝis la stacidomo?

— Tio ne kostas multe. Por vi mi rabatos 2 levojn.

— Dankon, mi volis nur scii, kiom mi ŝparus, se mi piedirus!

(El „Lernolibro de Esperanto“ de Zora Mladenova Hans kaj Georgi Hr. Dimov)

Por la paco. VI kajero. Moskvo, 1966. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de Sovetaj esperantistoj. P. 99, 20×13 cm.

Kantoj de niaj patroj. Moskvo, 1967. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de Sovetaj esperantistoj. P. 90, 21. 5×15 cm.

Pluvas sur la arbaron. 90-paĝa volumo kun rakontoj pri Lao popolo, eld. Neo Lao Haksat, 1967. P. 89, 19×14 cm.

Nia heroo popolo. Rakontoj pri la revolucia vivo de la popolgvigantoj kaj batalantoj de Vjetnamio. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1962. P. 270, 19×12,5 cm.

Nguyen Khai, Kun la defendantoj de Konko. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, Vjetnamio. 1967. P. 115, 19×13 cm.

Indaj gefiloj de la Lao-popolo. Eld. Neo Lao Haksat, 1966. P. 101, 18.5×13 cm.

Nguyen Thi, Patrino kun fosilo. El la kolekto da rakontoj pri la herooj de la Liberiga Armeo de Sud-Vjetnamio. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, Vjetnamio. P. 124, 13×9 cm.

La germana popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj. Eld. Deutsche Ligo für die Vereinten Nationen, Verlag Zeit im Bild, Dresden, GDR, 1967. P. 64, 23×16 cm.

Vilho Setälä, Fortoj de l' vivo, Fondumo Esperanto, Helsinki, 1967. P. 208, 21×14.5 cm. Prezo broŝurite 32 Steloj, bindite 60 Steloj.

Manuel Halvelik, Universala skribo. Unua eldono 1966. P. 128, 21×14.5 cm. Prezo 30 Steloj. Vendata de UEA.

Por la paco. VII kajero. Moskvo, 1967. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de Sovetaj esperantistoj. P. 92, 20,5×25 cm.

Ho Chi Minh, Kontraŭ la usona agreso por la nacia savo. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, Vjetnamio. P. 149, 19×13 cm.

ŜTATA TEKSA KOMBINUMO „VELA PEEVA“ — PAZARĜIK

Produktado kaj vendado de seke kaj malseke ŝpinitaj fadenoj kaj teksaĵoj por:

Konstruaj drelikoj,

Subŝtofa kanvaso,

tendotoĵoj,

Sakoj por: mineralaj sterkoj, sukero, kalcinita sodo, cepo, terpomoj k. a.

La supremenciitajn artiklojn serĉu je adreso:

DTK „Vela Peeva“, PAZARĜIK

Tel. 20-61

20-62

BULGARA ESPERANTO-MUZEO

Omage al la 80-jara datreveno de la kreo de Esperanto entreprenas la jenajn gravajn agojn:

1. 1—10 de decembro 1967 ĝi organizas libro-gazetan ekspozicion en la Nacia Biblioteko en Sofio.

2. Pligrandigi la stokon de esperantaj libroj kaj gazetoj en la kadro de Nacia Biblioteko.

Pro tio la Muzeo urĝe petas la esperantistojn el la tuta lando, fari sian kontribuon donacante librojn kaj gazetojn, kiujn ili donu aŭ sendu al la adreso: D-ro Boris Nedkov — Sofio, Bulv. „Dim. Blagoev“ 35.

Rimarko: 1. La muzeo jam transdonis 500 esperantajn librojn al la Nacia Biblioteko, kaj ĝis la fino de la kuranta jaro devas pligrandigi la stokon tie, ĉar en la nova 1968 jaro estos farita listo de ĉiuj esperantaj libroj kaj gazetoj, kiu estos presita kaj disdonita por uzado al la bulgara esperantistaro.

2. Sen sufiĉa kvanto da esperantaj libroj kaj gazetoj en la Nacia Biblioteko, ni ne rajtas insisti pri speciala E-fako en ĝi.